# *BEKTRI enhavo*


| paĝo | enhavo | metodo de praktikado |
|---|---|---|
| 1 | ig kaj iĝ sistemo | klarigado |
| 2 | a + ig, iĝ | skribekzerco |
| 3 | a + ig, iĝ | skribekzerco |
| 4 | a + ig, iĝ | skribekzerco |
| 5 | tempordo | klarigado, ekzerco |
| 6 | tempordo | parolekzerco |
| 7 | a + ig, iĝ | valencia metodo + |
| 8 | repasado | valencia metodo + |
| 9 | o + ig, iĝ | skribekzerco |
| 10 | o + ig, iĝ | skribekzerco |
| 11 | subordita propozicio: kiam | valencia metodo + |
| 12 | repasado | valencia metodo + |
| 13 | almovo + n | klarigado |
| 14 | movo, almovo | skribekzerco |
| 15 | aliaj + ig, iĝ | skribekzerco |
| 16 | aliaj + ig, iĝ | skribekzerco |
| 17 | enketilo | valencia metodo + |
| 18 | por, pro, ĉar, tial | valencia metodo + |
| 19 | ita(j)(n) | klarigado |
| 20 | ita(j)(n) | valencia metodo + |
| 21 | repasado | valencia metodo + |
| 22 | Vtr + iĝ | skribekzerco |
| 23 | Vtr + iĝ | skribekzerco |
| 24 | Vtr + ig | skribekzerco |
| 25 | repasado | valencia metodo + |
| 26 | estas + e | klarigado |
| 27 | estas + e | valencia metodo + |
| 28 | Vntr + ig | skribekzerco |
| 29 | Vntr + ig | skribekzerco |
| 30 | diskutado | klarigado |
| 31 | diskutado | valencia metodo + |
| 32 | Vtr + iĝ | skribekzerco |
| 33 | Vetero | valencia metodo + |
| 34 | ig, iĝ | skribekzerco |
| 35 | Vntr + iĝ | skribekzerco |
| 36 | repasado | valencia metodo + |
| 37 - 41 | ĉiu(j)(n), kiu(j)(n) | klarigoj kaj skribekzercoj |


BEKkurso de Esperanto -- BEKDU

Verkita de Dennis Eduard Keefe, 1987, 1994
Ĉiuj Rajtoj Rezervitaj.

# LA -IG KAJ -IĜ SISTEMO

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| A | + | IG = Vtr | => | purigi |
| | | IĜ = Vntr | => | laciĝi |
| O | + | IG = Vtr | => | kolorigi |
| | | IĜ = Vntr | => | enbusiĝi |
| aliaj | + | IG = Vtr | => | arigi |
| | | IĜ = Vntr | => | kuniĝi |
| Vtr | + | IG = Vtr | => | manĝigi |
| | | IĜ = Vntr | => | aŭdiĝi |
| Vntr | + | IG = Vtr | => | daŭrigi |
| | | IĜ = Vntr | => | sidiĝi |

## Vi lernos, kaj praktikos skribe:

A + IG = Vtr
A + IĜ = Vntr

1 Lia Esperanto estas pli kaj pli perfekta.

⇒ Lia Esperanto perfektiĝas.

⇒ Li perfektigas sian Esperanton.

2 Post la granda vespermanĝo li estis tute sata.

⇒ Li satiĝis pro la granda vespermanĝo.

⇒ La granda vespermanĝo tute satigis lin.

3 La ebriulo trinkis la tutan botelon da vino, do li estis tute ebria.

⇒

⇒

4 Se vi manĝos tro da sukero, bombonoj, kaj dolĉaĵoj, vi estos dika.

⇒

⇒

5 La prezo de busbileto estis unu dolaro. Nun ĝi estas pli alta. Ĝi estas du dolaroj.

⇒

⇒

6 Li glutis pilolon por esti trankvila.

⇒

⇒

7 La nigra tabulo estas nun <u>pura</u>, ĉar nia instruisto forviŝis ĝin per la forviŝilo.

⇒

⇒

8 Estis iom da pluvo antaŭ dek minutoj, do la stratoj kaj trotuaroj estas <u>malsekaj</u>.

⇒

⇒

9 Johano laboris multege hieraŭ, do li estis terure <u>laca</u>.

⇒

⇒

10 Du semajnojn post la komenco de aŭtuno, la folioj de la arboj estis <u>flavaj</u>, <u>brunaj</u>, kaj <u>ruĝaj</u>.

⇒

⇒

11 Pablo estas tre <u>alta</u> pro la fakto, ke li trinkis multe da lakto kiam li estis knabo.

⇒

⇒

12 La uzo de Esperanto estos <u>pli vasta</u>, se ĝia instruado estos pli bona!

⇒

⇒

13 Kvankam li havas nur 45 jarojn, li aspektas <u>maljune</u> pro sia laboro en karbminejo.

⇒

⇒

14 Ĉu ŝiaj revoj iam estos realaj?

⇒

⇒

15 En la kuirejo por la matenmanĝo, oni metas la lakton sur hejtoplaton dum du minutoj, por ke ĝi estu varma.

⇒

⇒

16 La profesoro ŝercis iomete, por ke la kursanoj estu viglaj.

⇒

⇒

17 La estro de la oficejo plialtigis lian salajron, do nun li estas kontenta.

⇒

⇒

18 Li devis prelegi antaŭ 200 personoj, tial (=do) li estis ege nervoza.

⇒

⇒

19 Ŝi estis pala pro la malsano kiun ŝi havis.

⇒

⇒

20 Post nur du kanzonoj la rokgrupo Beatles (skaraboj) estis treege popularaj.

⇒

⇒

Vi lernos, kaj praktikos

## Tempordo II

Dum BEKUNU vi lernis kaj praktikis tempordon per la sekvaj tempindikiloj:

Je la sepa mi vekiĝis.
Poste mi ellitiĝis kaj iris al la banĉambro.
Post tio mi matenmanĝis.
Dudek minutojn poste, mi prenis aŭtobuson kaj iris al mia laborejo.
Mi laboris inter la oka kaj la dek dua.
Mi manĝis de la dek dua ĝis la dek tria pli malpli.
Post la manĝo mi rekomencis labori.
Tiam mi tajpis leteron por la estro. KTP.

Nun ni lernos kaj praktikos aliajn tempindikilojn, kaj ni uzos subpropoziciojn de tempo. Jen kelkaj ekzemploj:

Kiam mi estis en Parizo lastjare, mi vizitis la Ejfelturon.
Dum mi matenmanĝis hodiaŭ, mi aŭskultis la novaĵojn de la radio.
Post kiam li rigardis la televidan futbalmatĉon, li malŝaltis la televidilon.
Antaŭ ol vojaĝi al Usono, Sinjoro Rodrigo aĉetis la aviadilan bileton.
Antaŭ ol li vojaĝis al Usono, Sinjoro Medrano aĉetis vojaĝĉekojn.

Ekzerco: plenumu la sekvajn spacojn per *dum, post kiam*, kaj *antaŭ ol*.

1 _______ mi vojaĝis per trajno al Parizo, ni parolis france kun la vojaĝanto kiu sidis apud mi.

2 _______ mi revenis hejmen, mi hejtis la fornon kaj enmetis la kokinaĵon.

3 _______ lasi la oficejon, mi malŝaltis mian komputilon.

4 _______ Paŭlo kaj Maria geedziĝis, ili aĉetis orajn ringojn.

5 Mi ekprelegos _______ ĉiuj ĉeestantoj sidiĝos.

6 _______ foriri, ne forgesu vian pluvombrelon!

Vi praktikos

## Tempordo II

## Kion faris Sinjoro Rodrigo, la hispano, hieraŭ?

| | |
|---|---|
| 700 | vekiĝi |
| 705 | leviĝi |
| 706 | iri al la banĉambro |
| 707--720 | duŝi sin, sekigi sin per bantuko, vesti sin, kombi sin, razi sin, brosi siajn dentojn |
| 721 | matenmanĝi |
| 730 | diri "adiaŭ" al sia edzino kaj kisi ŝin |
| 731 | eliri el sia loĝejo |
| 735 | piediri al la kiosko |
| 736 | aĉeti ĵurnalon |
| 740 | atendi aŭtobuson |
| 745 | enbusiĝi kaj pagi la stiriston |
| 755 | alveni al sia laborejo |
| 800 | komenci labori |
| | --paroli kun la sekretariino |
| | --uzi la telefonon |
| | --sendi fakson |
| | --sendi elektronikan leteron |
| | --skribi leterojn komputile, kaj subskribi ilin mane |
| 1500 | fini sian laboron |
| 1505 | lasi sian laborejon kaj iri hejmen |
| 1515 | tagmanĝi kun sia edzino |
| 1700 | legi la ĵurnalon kiel kutime |
| 1800 | rigardi la televidon |
| 1900 | ludi kun siaj gefiloj |
| 2000 | duŝi sin alifoje kaj kanti kaj zumi |
| 2100 | trinki glaseton da ŝereo |
| 2100--2200 | babili kun sia edzino |
| 2400 | enlitiĝi kaj dormiĝi (ekdormis) |
| | sonĝi |
| | Pri kio li sonĝis? Priskribu la sonĝon! |

## Vi praktikos

A + IG
A + IĜ

1 Ĉu lia Esperanto estas pli kaj pli perfekta?
2 Kial la ebriulo estas ebria? Ĉu la vino? Ĉu la viskio? Ĉu la brando?
3 Kio okazis al la prezo de busbileto? Ĉu ĝi estas pli alta?
4 Ĉu li estas pli trankvila pro la fakto, ke li glutis pilolon?

5 La planko estas tute malpura! Kiu faris tion?
6 Kial la gelernantoj estas tiom lacaj post la esperanta leciono?
7 Tiuj laboristoj havas nur kvardek jarojn, sed ili aspektas pli maljunaj. Kial ili estas tiaj?
8 Kio okazas al la folioj en la aŭtuno?

9 Kial Pablo iĝis tiel alta?
10 Se la instruado de Esperanto estos pli bona, ĉu la uzado estos pli vasta?
11 Ĉu ŝiaj revoj iam estos realaj. Kio estas via opinio pri tio?
12 Pro kio oni metas la manĝaĵojn en la fornon? Por ke ili estu pli varmaj?

13 Ĉu iliaj salajroj estas pli altaj nun?
14 Kio estas la kaŭzo de lia nervozeco?
15 Kial ŝi havas tiu tiel palan vizaĝon?
16 Kiam tiu rokgrupo iĝis populara? Ĉu vi rememoras?

17 Ĉu la kursanoj estis pli viglaj, ĉar la instruistino ŝercis iomete?
18 Kial tiu infano estas tiel dika? Ĉu pro la dolĉaĵoj? Ĉu la glaciaĵoj?
19 Bonvolu diri al mi, pro kio la impostoj en la urboj estas pli altaj nun.
20 Pro kio estis ege varme en la klasĉambro?

## Vi praktikos

### Repasado

1 Bonan tagon. Kiel vi fartas? (Kiel vi statas?)
2 Kiel vi nomiĝas? Ĉu vi estas Usonano?
3 Kio estas via antaŭnomo, kaj kio estas via familia nomo?
4 Kiu mi estas, kaj kio mi estas, kaj kia mi estas, kaj kie mi estas?!

5 Ĉu London estas en Ĉinio?
6 Kie Tokio troviĝas? Ĉu tiu urbo estas vizitinda? Kial aŭ kial ne?
7 Ĉu Londono estas granda, mezgranda, aŭ malgranda?
8 Kia estas la urbo kie vi loĝas?

9 Ĉu Novjorko estas pli granda ol Bostono?
10 Ĉu Usono kaj Ĉinio estas pli grandaj ol Portugalio kaj Hungario?
11 Kiu urbo estas la plej granda en via lando?
12 Kiel nomiĝas la urbo kie vi troviĝas nun? Kaj kio estas la nomo de la urbo kie vi naskiĝis?

13 Ĉu Parizo estas granda? Kio estas vidindaĵoj en Parizo?
14 Kiuj urboj estas pli etaj ol Parizo?
15 Ĉu Tokio estas urbeto aŭ urbego?
16 Ĉu vi estas lernanto de la japana lingvo?

17 Ĉu Esperanto estas aĉa lingvo aŭ bona lingvo por komuniki?
18 En nia kurso de Esperanto, kiom da lernantoj, kaj kiom da lernantinoj estas?
19 Bonvolu diri al mi, kie troviĝas nia kurso de Esperanto. Ĉu nia ejo estas bona kaj agrabla?
20 Laŭ vi, ĉu Esperanto estas iomete facila, aŭ facilega? Ĉu ĝi estas lerninda?

21 Kaj la angla, en via opinio, ĉu ĝi estas pli facila ol la germana aŭ rusa?
22 Rigardu la unuan desegnaĵon. Ĉu tio sub la tablo estas katoj aŭ hundoj?
23 Kio estas tio super la tablo ĉirkaŭ la lampo?
24 Kiu objekto estas tiu objekto inter la muŝoj?
25 Kiuj katoj estas altaj, kaj kiuj malaltaj?
26 Kiu estas alta, kaj kiu malalta sur la unua bildo?

## Vi lernos, kaj praktikos skribe

$$O + IG = V_{tr}$$
$$O + I\hat{G} = V_{ntr}$$

1 Ŝi iris en la liton hieraŭ multe pli malfrue ol kutime. (IĜ)

⇒ Ŝi enlitiĝis {hieraŭ multe pli malfrue ol kutime.}

2 Ŝi eliris el la lito la sekvantan tagon tre frue. Ŝi ne dormis sufiĉe.(IĜ)

⇒ Ŝi

3 La instruistino diris al la geknaboj, "Metu vin en la viçon!" (IG) (IĜ)

⇒

⇒

4 La du aŭtovojoj formas krucon dek kilometrojn ekster la urbo. (IĜ)

⇒

5 La pasaĝeroj kiuj iros al Berlino eniris en la buson. (IĜ)

⇒

6 La instruisto uzis kolorojn en la unua bildo de la BEKKurso, por ke la gelernantoj lernu la kolorojn kaj adjektivojn pli rapide kaj bone. (IG)

⇒

7 La kelnero metis la manĝilaron sur la tablon kaj atendis la manĝontojn. (IG)

⇒

8 Iuj klientoj eniris en la butikon, kaj aliaj eliris. (IĜ, IĜ)

⇒ ⇒

9 Post la eklernado de la nova gramatikaĵo, la lernantoj ofte formis grupojn por praktiki la novaĵon kaj alproprigi ĝin. (IĜ)

⇒

10 La fianĉo diris *jes*, kaj tuj poste la fianĉino diris la samon dum la ceremonio por novaj geedzoj en la preĝejo. (IĜ)

⇒

11 Li prenis la globkrajonon kaj eltiris (eligis) ĝin el sia poŝo. (IG)

⇒

12 La armeo de la Unuiĝintaj Nacioj alvenis al la lando kie la kruelaj bataloj okazis, por ke estu paco en la lando. (IG)

⇒

13 Estis frumatene kaj iom post iom estis pli kaj pli da lumo. La mateno alvenis iom post iom. (IĜ, IĜ)

⇒ ⇒

14 La vintro alvenis. La temperaturoj malsupreniris (falis), kaj estis pli kaj pli da frosto sur la kamparo. (IĜ)

⇒

15 Kelkaj personoj eniris en la vagonaron (trajnon), kaj kelkaj personoj eliris el ĝi. (IĜ, IĜ)

⇒ ⇒

16 Subite la torpedita ŝipo eksinkis, kaj la ŝipestro kriis al la ŝipanaro,"Eliru el la ŝipo! Kaj sidiĝu en la savboatojn!" (IĜ, IĜ)

⇒ ⇒

17 Estas kvar gradoj en la BEK: BEKUNU, BEKDU, BEKTRI, kaj BEKKVAR.(IG)

⇒ La verkisto de BEK . . .

## Vi lernos, kaj praktikos

### *Kiam* en subordítaj propozicioj

1 Ĉu nia instruisto jam estis ĉi tie, kiam vi alvenis al nia kurso hodiaŭ?
2 Kiun vi vidis unue, kiam vi eniris en la lernoĉambron hodiaŭ?
3 Kie vi sidis, kiam vi venis al nia kurso la unuan tagon?
4 Kun kiu aŭ kun kiuj vi parolis, kiam vi faris la parolekzercon pri "Mia ĉemizo estas...?

5 Kion vi faros, kiam vi hejmeniros post la hodiaŭa leciono?
6 Ĉu pluvis, kiam vi vekiĝis ĉi matene?
7 Ĉu la suno briladis, kiam vi vekiĝis hodiaŭ?
8 Bonvolu diri al mi, kie vi pensas la instruisto estis, kiam vi matenmanĝis ĉi matene.

9 Kutime, kien vi iras, kiam vi ferias?
10 Al kiu loko vi iris lastjare (en la pasinta jaro), kiam vi feriis?
11 Kiam vi veturas per buso aŭ per trajno, ĉu vi ofte legas ĵurnalon?
12 Kio plaĉas al vi fari, kiam vi havas libertempon?

13 Kion vi ŝatas fari, kiam vi ne devas fari ion specialan?
14 Ĉu vi scias, ĉu Winston Churchill ankoraŭ vivadis, kiam vi naskiĝis?
15 Ĉu vi ĉiam aĉetas ion, kiam vi iras al ĉiovendejo, aŭ ĉu vi rezistas al la tento elspezi vian monon?!
16 Kiam vi aŭskultas la radion, kiajn muzikojn vi aŭskultas? Rokan, klasikan, ĵazan, blusan, popolan, barokan, punkan, folkan?

17 Kiam vi iras rigardi filmon en kinejo, ĉu vi preferas iri sole, kun nur unu alia persono, aŭ kun aro da personoj?
18 Kion vi pensas la fremdlandaj turistoj faras, kiam ili iras al Parizo?
19 Kaj kion vi pensas la Eŭropanoj faras, kiam ili vizitas Novjorkon aŭ Ĉikagon?
20 Ĉu vi rememoras kie vi estis, kiam vi aŭdis pri la internacia lingvo Esperanto la unuan fojon?

21 Laŭ vi, kion faris la ebriulo, kiam li eltrinkis la botelon da vino?
22 Laŭ vi, kion faris Sinjoro Nopo, kiam li mortigis la kvar muŝojn?
23 Viaopinie, kien iris Leopoldo, kiam li finis la ekzercon kun la peziloj?
24 Laŭ vi, kion diros nia instruisto, kiam ni finos nian ekzercon pri *kiam*?

## Vi praktikos:

**Repasado**

1 Rigardu la bildon sur kiu estas la tablo, la kvar katoj, la lampo kaj tiel plu. Kio tio estas dekstre de la tablo?
2 Diru al mi, kio tio estas maldekstre de la tablo, kaj ankaŭ diru al mi, kiu estas apud ĝi.
3 Ĉu forko estas manĝilo? Donu al mi la nomojn de du aliaj manĝiloj.
4 Ĉu manĝilo estas ilo por skribi, kaj skribilo estas ilo por manĝi? Aŭ inverse (male, kontraŭe)?

5 Kiu estas tiu kiu estas alta, kaj tiu kiu estas malalta sur la bildo?
6 Ĉu vi vidas alian personon sur la bildo? Ĉu estas iu sur la tablo?
7 Kia estas la lampo, kaj kiaj estas la muŝoj? Ĉu ie estas ruĝaj muŝoj?
8 Kie la lampo estas, kaj kie la muŝoj estas?

9 Ĉu estas du lampoj sur la bildo?
10 Kial oni ŝaltas lampon? Por lumigi aŭ por mallumigi ĉambron?
11 Bonvolu doni al mi glason da akvo, se vi havas ĝin.
12 Bonvolu tuj doni al mi la tason kiu troviĝas en la ŝranko.

13 Kia estas via ĉemizo?
14 Kian ĉemizon mi surhavas?
15 Kiajn ŝuojn vi surhavas? Ruĝajn, bluajn, blankajn, brunajn, nigrajn, aŭ aliajn?
16 Kies ŝuoj estas pli longaj? Miaj aŭ viaj aŭ alies?

17 Ĉu la ĉemizo kiun vi nun portas (surhavas) estas pli hela ol mia?
18 Kian ĉemizon vi surhavis, kiam vi ĉeestis nian kurson la unuan tagon?
19 Ĉu vi rememoras, kian ĉemizon aŭ kiajn ŝuojn mi portis tiam?
20 Kian ĉemizon vi portis hieraŭ, kian vi portas nun, kaj kian vi portos morgaŭ?

21 Iru al la paĝo14 de BEKUNU. Kiel nomiĝas la persono kiu legas?
22 Ĉu vi pensas, ke la libro kiun li legas estas eta aŭ ega?
23 Ĉu vi pensas, Pablo aĉetis tiun libron en librovendejo aŭ en kiosko? Kial? Ĉu Pablo emas legi? Ĉu li estas legema?
24 Ĉu la libro de Pablo plaĉas al vi? Ĉu vi ŝatas hispanajn librojn?

## Vi lernos:

**almovo + n**

## Trastudi la sekvajn ekzemplojn:

1 Li prenis la libron (de sur la seĝo) kaj metis ĝin sur la tablon.
2 Nun la libro kuŝas sur la tablo.

3 La kato estis ekster la domo. Nun ĝi estas ene. Ĝi kuris en la domon.
4 Nun la kato estas en la domo.

5 La rano estis sur la bordo de la lago. Poste, ĝi saltis en la akvon.
6 Nun la rano estas en la akvo.

7 Unue, la muŝoj estis sur la tablo. Poste, ili flugis ĉirkaŭ la lampon.
8 La muŝoj flugas ĉirkaŭ la lampo nun.

9 La aviadilo estis en Londono. Poste, trans la maron flugis la aviadilo.
10 Nun ĝi flugas de Novjorko al Ĉikago. Trans la maro flugas la aviadilo.

11 Iri dekstren, maldekstren, antaŭen, malantaŭen, supren, malsupren.
12 Iri, (flugi, vojaĝi, piediri, paŝi ktp), norden, suden, orienten, okcidenten.

13 Ŝi iris al Parizo.
14 Ŝi iris Parizon.
15 Ŝi venis de Parizo.
16 Ŝi iris ĝis Parizo.

17 Kie vi estis antaŭhieraŭ vespere?
18 Kien vi iros ĉi vespere? Kien vi iros post nia leciono hodiaŭ?
19 De kie vi venis? De via loĝejo? De la supermerkato? De la kinejo?
20 Al kiu lando vi iros por la Kongreso de Esperanto?
21 {Kiun landon vi iros por la Kongreso de Esperanto?}

Vi lernos, kaj praktikos

movo, almovo

## Ekzerco

1 Morgaŭ matene mi devas iri al London___.
2 Kie___ vi loĝas kaj laboras?
3 Kie___ vi iros por via ferio en la venonta jaro?
4 La hundo estis ekster la domo. Nun ĝi estas ene. Ĝi iris en la dom___.

5 En la bestĝardeno la bestoj kuris en la kaĝ___ la tutan tagon.
6 La dresisto de leonoj eniris en la kaĝ___ de la leonoj por doni viandon al ili.
7 La hirundoj flugis trans la river___, ĉar trans la river___ sin trovis aliaj hirundoj. (Z)(PIV)
8 Ĉe la trafiklumo, turnu dekstre___.

9 Por atingi la ĉefurbon, vi devas daŭrigi vian vojaĝon norde___.
10 En 1983 ni iris al Budapest___ por la Universala Kongreso de Esperanto.
11 En la venonta somero ni vojaĝos Novjork___ por vidi la altegajn ĉielskrapantojn.
12 De kie___ venis tiuj turistoj kiujn ni vidis en la kafejo?

13 Iru pli supre___.
14 Supre___ troviĝas sur la breto la salujo kaj la piprujo. Ekprenu ilin.
15 Estis tro malvarme al ni en Germanio, do ni aŭtomobilis en varm___, bel___, ĉarm___ Hispan___. Alivorte, ni iris de Germanio ĝis Madrido kaj aliaj hispanaj urboj.
16 Venu ĉi tie___. Ne iru tie___.

## Vi lernos, kaj praktikos skribe:

aliaj + iĝ = $V_{ntr}$
aliaj + ig = $V_{tr}$

1 Vesperon, la birdoj flugis en la arbon por tranokti. (ar)

⇒ (iĝ) Vesperon, la birdoj <u>ariĝis</u> en la arbon por tranokti.

2 La dentisto plombis du dentojn de la paciento, kaj li eltiris la dekstran, suban molaron. (el)

⇒ (ig)

3 Antaŭ sia vojaĝo al Romo, Maria enmetis siajn kombilon, ŝminkon, broson, biletujon, ŝlosilojn, aviadilbiletojn, kaj pasporton en sian mansakon. (en)

⇒ (ig)

4 La birdoj ekflugis disen kiam ili ekaŭdis la laŭtajn pafojn de la pafiloj de la ĉasistoj. (dis)

⇒ (iĝ)

⇒ (ig)

5 Unu aŭ du horojn poste, la ĉasistoj foriris kaj tiam la birdoj revenis kune. (kun)

⇒ (iĝ)

6 Ŝi kaj li lernis Esperanton per la BEKkurso. Poste ili iĝis membroj de la loka klubo de Esperanto en sia urbo. (an)

⇒ (iĝ)

7 Post la fino de BEKKVAR nun eblas al ŝi legi iomete la revuojn kaj aliajn periodaĵojn de Esperanto kiel *Monaton, Kontakton, Eventojn,* kaj *Heroldon de Esperanto.* (ebl)

⇛ (ig)

8 Nuntempe en oficejoj kaj laborejoj ĉie, oni uzas komputilojn kaj aliajn elektronikajn maŝinojn anstataŭ la skribmaŝinoj kaj aliaj malmodernaj iloj. (anstataŭ)

⇛ (ig)

⇛ (iĝ)

9 Sinjoro Rodrigo veturis tiun matenon al la laborejo per metroo. Poŝoŝtelisto alproksimiĝis al li, kaj poste malproksimiĝis de li. Poste li estis sen biletujo! (sen)

⇛ (ig)

10 Estis matene, kaj du vakeroj rajdis ĉevale sur la vasta ebenaĵo de Teksaso, la granda ŝtato de Usono. Unu vakero diris al la alia: "Rigardu! Niaj bovoj estas dise! Ili estas ĉie! Ne devas esti! Ili devas esti nur are, grupe! (ar)

⇛ (ig)

⇛ (iĝ)

11 La konsilio (konsilantaro) de la granda entrepreno ne estis kontenta pri la financaj rezultoj de la prezidanto, ĉar li elspezis tro, kaj li enspezis ne sufiĉe. (eks)

⇛ (ig)

12 La reĝo abdikis pro amo al bela virino kiu ne estis kortegano, do nun li ne plu estas reĝo. (eks)

⇛ (iĝ)

13 La kato estis en la domo. La patro vidis ĝin. Poste la kato estis ekster la domo. (ekster)

⇛ (ig)
⇛ (iĝ)

## Vi lernos, kaj praktikos

### Enketilo, demandaro

1 Kio estas via familia nomo?
2 Kaj via antaŭnomo?

3 En kiu urbo vi nun loĝas?
4 Kiom da loĝantoj loĝas tie?
5 Ĉu vi konas la nomon de la urbestro?

6 Kiom da jaroj vi havas? Malpli ol 20 jarojn? Inter 20 kaj 40? Aŭ pli ol 40 jarojn?
7 Ĉu vi estas lernanto aŭ studento?
8 Se ne, kio estas via profesio?

9 Ĉu vi loĝas en domo aŭ apartamento?
10 Se vi loĝas en domo, ĉu ĝ havas remizon?
11 Se vi havas apartamenton, ĉu la konstruaĵo havas ŝtuparon aŭ lifton?

12 Ĉu vi havas ŝparkonton kaj ĉekkonton?
13 Kiel nomiĝas via banko?
14 Ĉu vi estas kontenta rilate la servadon de via banko?
15 Se ne, kial ne?

16 Kiom ofte vi iras al kinejo por vidi filmon? 1) Neniam 2) Nur se estas bonega filmo 2) De tempo al tempo 3) Tre ofte. 4) Ĉiam kiam vi povas.

17 Kiom ofte vi manĝas en restoracio? 1) Neniam--vi ĉiam manĝas hejme aŭ kunportas vian manĝon 2) Ege malofte 3) Kelkfoje ĉiujare 4) Ĉiusemajne 5) Inter du kaj kvarfoje ĉiusemajne 6) Ĉiutage

18 Laŭ kiu maniero vi eksciis pri Esperanto? 1) Vi aŭdis pri ĝi en la lernejo 2) Vi eksciis pri ĝi en artikolo de ĵurnalo 3) Amiko aŭ amikino informis vin pri ĝi. 4) Konato aŭ konatino sciigis vin pri Esperanto 5) Vi eksciis pri Esperanto alimaniere. (Kiamaniere?)

Vi lernos, kaj praktikos skribe: **por, pro, ĉar, tial**

1 Ĉu la leganto en la biblioteko ŝaltis la lumon <u>por</u> vidi pli bone?
2 Ĉu la biblioteko aĉetis novajn librojn <u>por, ke</u> la legantoj havu pli da legaĵoj?
3 Ĉu Inma Medrano estis en la biblioteko, <u>ĉar</u> ŝi deziris pruntepreni librojn <u>por</u> legi hejme?
4 Ĉu estis pli da legantoj en la biblioteko hieraŭ <u>pro</u> la aĉa vetero?

5 Ĉu vi venis tien ĉi hodiaŭ <u>tial, ke</u> vi deziris lerni la hispanan lingvon?
6 Ĉu vi venis ĉi tien hodiaŭ <u>pro tio, ke</u> vi volis paroli Esperanton?
7 Ĉu nia instruisto ĉeestis nian kurson <u>por, ke</u> ni lernu pli rapide?
8 Ĉu ni lernas rapide, <u>ĉar</u> ni praktikas multe per la BEKkurso?

9 Ĉu la paciento venis paroli kun la kuracisto, <u>ĉar</u> lia aŭto paneis?
10 Ĉu la kuracisto donis injektaĵon al la paciento, <u>ĉar</u> li estis tute sana?
11 Ĉu la flegistino kaj flegisto venis al la malsanulejo <u>por</u> danci?
12 Ĉu la kuracisto iris al la operaciejo <u>pro la fakto, ke</u> li devis urĝe operacii Sinjoron Rodrigon pri apendicito?

13 Ĉu Paŭlo lasis sian veturilon ĉe la riparisto de aŭtoj <u>tial, ke</u> lia aŭto paneis?
14 Ĉu la riparisto rigardis sub la aŭto de Paŭlo <u>por</u> kontroli la bremsojn?
15 Ĉu li levis la kapoton <u>por</u> rigardi la motoron?
16 Ĉu Paŭlo donis ĉekon al la riparisto <u>por</u> pagi la riparitan veturilon?

17 Ĉu Ramono prenis la gladilon <u>por</u> glatigi sian ĉifitan pantalonon sur la gladotabulo?
18 Kial li metis en la fridujon viandon kaj ovojn? <u>Por ke</u> ili restu freŝaj kaj ne putru?
19 <u>Pro kio</u> li uzis la polvosuĉilon? <u>Por</u> forigi la polvon de la tapiŝo?
20 Ĉu Ramono remetis la kokidaĵon en la fornelon <u>tial, ke</u> ĝi ne estis sufiĉe varma?

21 Ĉu Maria semis karotojn en sia ĝardeno, <u>por</u> manĝi ilin poste?
22 Ĉu ŝi akvumis siajn plantojn, <u>por ke</u> ili kresku?
23 Ĉu Maria uzis ŝpaton <u>por</u> elterigi la termpomojn?
24 Ĉu ŝi ne rikoltis multe el sia ĝardeno ĉi jare <u>pro</u> manko da pluvo?

Vi lernos, kaj praktikos

ITA(J)(N)
Participoj -- Pasivaj -- Adjektivaj

## Ekzemploj:

La pordo estas fermita. (nun, ĉar oni fermis ĝin.)
La fenestroj estas malfermitaj. (nun, ĉar estas tre malvarme ekstere.)
La glasoj estas rompitaj. (nun, ĉar ili falis sur la plankon.)
Tiu glaso ne estas rompita. (do, ni povas trinki el ĝi.)

Unue ni lernos kaj praktikos participojn kiuj indikas nunajn rezultojn. Bonvolu rigardi la sekvantajn ekzemplojn.

La knabo kiu ludis kun la pilko **rompis** la fenestron.
⇛ Do nun la fenestro estas **rompita**, kaj oni devas ripari ĝin.

Hodiaŭ la sekretariino **tajpis** dek leterojn per komputilo.
⇛ Do nun dek leteroj estas **tajpitaj** kaj pretaj por sendi.

La dornoj de la rozujo **ŝiris** lian pantalonon.
⇛ Do nun lia pantalono estas **ŝirita**, kaj iu devas kudri ĝin.

Li ĵus **lavis** la manĝilaron.
⇛ Do nun la manĝilaro estas **lavita**. La forkoj, tranĉiloj ktp estas puraj.

En BEKKVAR, la lasta parto de la BEKKURSO, vi profunde studas multajn aliajn participojn. Krome, vi vidos la rilaton inter tiuj participoj kaj ĉio kion ni studis en BEKTRI kaj BEKDU.

## Vi praktikos

### Participoj

1 Ĉu la instruisto fermis la pordon?
2 Ĉu la instruisto fermis ankaŭ la fenestrojn?
3 Ĉu oni ŝaltis la radion?
4 Ĉu iu malŝaltis la lampojn de la alia ĉambro?

5 Ĉu la geknaboj malfermis siajn kajerojn por skribi?
6 Ĉu la kelnero jam malkorkis la ruĝan vinon por la gastoj?
7 Ĉu Pablo tradukis tiun tekston?
8 Ĉu la sekretariino tajpis ĉiujn leterojn per komputilo?

9 Ĉu oni menciis Esperanton en tiu revuo?
10 Ĉu oni difektis la fridujon kiu estas en la alia ĉambro?
11 Ĉu hodiaŭ la geknaboj senintence rompis la fenestrojn de nia najbaro?
12 Ĉu iu parkis aŭton antaŭ la pordo?

13 Ĉu oni riparis vian aŭtomobilon kiu paneis?
14 Ĉu Pablo la panisto bakis sufiĉe da pano por hodiaŭ?
15 Ĉu vi skribis la leterojn kiujn vi deziras sendi al viaj parencoj?
16 Ĉu Miguel Fernandez tradukis la libron "Bodas de Sangre" en Esperanton?

17 Ĉu ili pakis siajn valizojn por la vojaĝo hodiaŭ vespere?
18 Ĉu vi lavis la manĝilaron?
19 Ĉu oni forviŝis la nigran tabulon?
20 Ĉu en la klasejo oni fiksis afiŝojn ĉe la muro?

21 Ĉu vi aĉetis la poŝtmarkojn por la poŝtkartoj?
22 Ĉu iu el vi algluis la poŝtmarkojn sur la koverton?
23 Ĉu vi forĵetis la malnovajn ĵurnalojn en la rubujon?
24 Ĉu la firmao pagis la monon al la laboristoj?
25 Ĉu la kuiristo tranĉis la viandon por la tagmanĝo?

## Vi praktikos:

### Repasado

1 Ĉu vi rememoras Mipi kaj Mupi?
2 Ĉu ili parolas?
3 Ĉu ili parolas kun vi?
4 Ĉu Mipi parolas kun Mupi, kaj Mupi parolas kun Mipi?

5 Ĉu Mipi parolas la ĉinan lingvon? Ĉu la rusan? Ĉu li parolas arabe?
6 Kiun lingvon viaj samlandanoj parolas plej en via lando?
7 Ĉu vi nun lernas la lingvon kiun Mipi uzas?
8 Kion vi pensas pri la internacia lingvo Esperanto? Ĉu lerninda?

9 Kial, laŭ vi, Mipi scipovas Esperanton?
10 Ĉu Esperanto estas facile parolebla, legebla, kaj prononcebla?
11 Kiam vi eklernis Esperanton?
12 Ĉu vi prononcas Esperanton perfekte kaj senerare, aŭ ĉu vi misprononcas ĝin de tempo al tempo?

13 Ĉu via elparolo (prononcado) de Esperanto estas pli kaj pli bona. Alivorte, ĉu ĝi pliboniĝas?
14 Ĉu vi perfekte legas Esperanton, aŭ ĉu vi mislegas de tempo al tempo?
15 Kun kiuj vi parolas Esperanton en nia kurso?
16 Ĉu vi kredas, ke Esperanto estas aĉa lingvo, aŭ ĉu vi pensas, ke ĝi estas lerninda kaj studinda?

17 Kio estas la antaŭnomo de la ulo kiu skribas?
18 Ĉu li skribas esperante aŭ alilingve?
19 Per kio li skribas?
20 Priskribu la skribilon kiun li havas.

21 Ĉu vi pensas, ke Ramono ŝatas skribi? Tio estas, ĉu li estas skribema?
22 Kaj vi? Ĉu vi dirus, ke vi estas skribema? Kial (aŭ kial ne)?
23 Ĉu Ramono bone literumis la vortojn, aŭ ĉu li misskribis?
24 Kion vi devas fari se vi misskribas vorton aŭ frazon?

## Vi lernos, kaj praktikos

$V_{tr} + i\hat{g} = V_{ntr}$

1 Ni aŭdis la birdojn sur la tegmento kaj en la arboj.

⇒ La birdoj aŭdiĝis {sur la tegmento kaj en la arboj} ~~de ni~~.

2 La vento milde <u>movis</u> la foliojn sur la supraĵo de la malgranda lageto.

⇒

3 Mi <u>levis</u> min frue hieraŭ, ĉar mi devis fini mian hejmtaskon por nia kurso de Esperanto.

⇒

4 La kuracisto <u>savis</u> la vunditan viron.

⇒

5 Mia vekhorloĝo <u>vekis</u> min precize je la sepa kaj duono ĉi matene.

⇒

6 Oni <u>vidas</u> tukanojn kaj aliajn diverskolorajn birdojn en Sudameriko.

⇒

7 Lastan vendredon la profesoro <u>komencis</u> la lecionon dudek kvin minutojn malfrue, ĉar li maltrafis sian buson.

⇒

8 Paŭlo kaj Ramono <u>bakis</u> la panon en la forno longan tempon.

⇒

9 En la arbaro proksime de nia domo, vi trovos multajn sovaĝajn bestetojn.

=>

10 La laboristoj en la ŝufabriko finas siajn laborojn je la kvina.

=>

11 Paŭlo hieraŭ frumatene renkontis Marian sur la vojeto de la rivereto.

=>

12 Ĉe la plaĝoj en somero oni vendas glaciaĵojn ĉiumomente.

=>

13 Ne prononcu tiun vorton tiamaniere (ĝ), sed prononcu ĝin ĉi tiamaniere(ĵ).

=>

14 La estro de la estraro komencis la kunvenon je la oka, kaj finis ĝin je la naŭa kaj tri kvaronoj.

=>

15 Nia hotelo akceptas nur monbiletojn, vojaĝĉekojn, kaj kreditkartojn.

=>

16 En meznorda Usono oni rikoltas la tritikon en septembro, kaj la maizon en oktobro.

=>

17 Kiam li ekvidis la ŝtonegon kiu kuŝis meze de la vojo, la stiristo haltis la buson.

=>

18 Oni povas fleksi tian lignon iom facile sen rompi ĝin.

=>

Vi lernos, kaj praktikos:

$V_{tr} + ig = V_{tr}$

1 La gelernantoj lernas Esperanton rapide, ĉar la instruisto helpas ilin.

=> La instruisto lernigas Esperanton al la gelernantoj.

⇒ La instruisto igas la gelernantojn lerni Esperanton.

2 La geesperantistoj deziras, ke la registaroj agnoskos Esperanton por instrui ĝin en la lernejoj.

⇒

3 Pablo volis novan domon. Li parolis kun firmao kiu konstruas domojn. Ili (ne Pablo) konstruis la domon.

⇒

4 Mi verkis lernolibron por komencantoj de Esperanto. Mi deziras enmeti bildojn kaj ilustraĵojn en tiun libron. Mi parolis kun artisto, kaj li diris al mi, ke li povos ilustri la libron.

⇒

5 La instruisto montras la bildojn al la gelernantoj. Ili vidas la bildojn.

⇒

6 La instruisto havas kasedon. La gelernantoj aŭskultas ĝin.

⇒

7 La kruela, aĉa, stulta, stranga, kaj freneza ŝipestro diris, "Vipu tiun mariston! Al mi ne plaĉas lia nazo!"

⇒

Vi praktikos:

## Repasado

1 Ĉu la sciencisto legas?
2 Ĉu li sportas?
3 Se li sportus, ĉu li havus pli bonan sanon?
4 Ĉu li pensas pri historio kaj filozofio?

5 Kion faris la sciencisto por scii tiom multe?
6 Li estas tre malinteligenta, ĉu ne? Ĉu li dirus, ke li estas stulta?
7 Kial li surhavas okulvitrojn?
8 Ĉu vi pensas, ke estas bone lerni multe pri matematiko? Kaj pri fremdaj lingvoj?

9 Ĉu li estas la plej inteligenta kaj bela ulo en la tuta mondo?
10 Kies kapo estas granda? Tiu de la sciencisto aŭ tiu de Paŭlo?
11 Ĉu estas vere, ke la sciencisto nun pensas pri matematiko?
12 Ĉu ie sur lia kapo estas haroj? Alivorte, ĉu li havas hararon?

13 Ĉu vi scias tiom, kiom la sciencisto? eĉ pli ol li?!
14 Se vi tagmanĝus kun la sciencisto, pri kio vi parolus?
15 Ĉu vi opinias, ke li nun pensas por solvi grandan matematikan problemon, aŭ por sin amuzi?
16 Nun, diru al mi, kiu estas tiu ulo, kiu staras kun io longa kaj fleksebla en la dekstra mano.

17 Ĉu vi povas klarigi al mi, kial li havas tiun longan flekseblan ilon en la mano?
18 Ĉu la muŝoj ankoraŭ vivas aŭ ĉu ili estas jam mortintaj?
19 Kiom da muŝoj flugas en tiu muŝareto?
20 Se vi povus paroli la muŝan lingvon, kion vi dirus al tiuj kvar muŝoj kiuj flugas super la kapo de Sinjoro Nopo?

21 Kiam Sinjoro Nopo alparolas la muŝojn, kion vi pensas li diras: "Morton al la muŝaĉoj!" aŭ "Kiel bela vetero hodiaŭ!"
22 Ĉu la muŝoj nun penas forflugi kaj fuĝi?
23 Kio okazos se ili ne sukcesos fari tion baldaŭ?
24 Ĉu vi taksas Sinjoron Nopon frenezulo aŭ sanktulo? Ĉu vi estas certa pri via opinio?

## Vi lernos

Estas necese {, ke. . .}
Tio estas necesa {, ke. . .}

1 Estas varme.
2 Estas malvarme.
3 Estas varma tago.
4 Estis malvarma vetero.

5 Hodiaŭ estas varmege.
6 La vetero hodiaŭ estas varma.
7 Estas varme al mi. Kaj al vi?
8 Mi estas varma.

9 Romo varmas!
10 Estas vere, ke Esperanto havas interesegan gramatikon.
11 Estas bone, ke ili faris tion.
12 Tio estas vera, ke niaj gelernantoj lernas Esperanton rapide kaj forgesas ĝin malrapide.

13 Estas malvere, ke li diris tion!
14 Tio estas malvera, ke li diris tion!
15 Malveras, ke li diris tion!
16 Ke li diris tion, vere ne estas!

17 Estas necese, ke la kirurgo operaciu tuj.
18 Estas urĝe, ke ni havu kunvenon kiel eble plej baldaŭ.
19 Ne sufiĉe konate estas, ke Esperanto estas bonega aktivaĵo por infanoj kaj geknaboj.
20 Tio estas tro nekonata, ke Esperanto helpas nin lerni aliajn lingvojn pli bone kaj pli rapide.

21 Bedaŭrinde estas, ke estas tiom da militoj en la hodiaŭa mondo.
22 Estus tre agrable, se la suno ĉiam brilus ĉi tie!!
23 Kiel dirite supre, bonaj Esperantistoj lernas aliajn fremdlingvojn pli rapide.
24 Dresite, leono povas esti tiel milda kiel domkato!

Vi praktikos

Estas + e, (Tio estas + a), ke

1 Ĉu estas vere, ke du plus du faras kvar?
2 Ĉu estas vere, ke du foje tri faras ses?
3 Ĉu estas vere, ke ĉiuj en la mondo scipovas la anglan lingvon?
4 Ĉu tio estas vera, ke ni bezonas dormi ok horojn ĉiutage?

5 Ĉu estas agrable, sunumi sin kiam la temperaturo estas varmeta?
6 Ĉu agrable estas, pikniki en la kamparo?
7 Ĉu estus bonege, se ne estus militoj en la mondo?
8 Ĉu tio estus bona, se ĉiuj ne malamus aliajn?

9 Laŭ vi, ĉu estas sufiĉe konate, ke Esperanto estas multe pli simpla kaj pli efika ol la angla lingvo?
10 Ĉu tio estas konata, ke tiuj kiuj lernas Esperanton akiras aliajn lingvojn ege pli rapide?
11 Ĉu estas bedaŭrinde, ke oni bruligas la arbarojn de nia mondo?
12 Ĉu tio estas bedaŭrinda, ke estas tiom da polucio en niaj riveroj?

13 Ĉu al vi estas plaĉe, ke estas montoj da rubo ĉirkaŭ niaj urbegoj?
14 Ĉu estas kutime en Germanio, ke oni legas francajn ĵurnalojn?
15 Ĉu estas urĝe, ke ni solvu internaciajn komunikajn problemojn?
16 Ĉu urĝas, ke la registaroj forigu la problemon de senlaboreco en la mondo?

17 Ĉu estas efike, ke oni veturas de Parizo ĝis Novjorko per eta boato?
18 Ĉu estas plej efike, lerni lingvon per la traduka metodo?
19 Ĉu estus ridinde, se ĉiuj irus al la laborejoj kun ruĝaj ĉapeloj kaj flavaj gantoj?
20 Ĉu estus mirinde, se hundoj stirus aŭtomobilojn kaj busojn?

Vi lernos, kaj praktikos

$V_{ntr} + ig = V_{tr}$

1 La vento forte ekblovis kaj kelkaj kaŝtanoj falis sur la grundon.

⇒ La forta vento faligis kelkajn kaŝtanojn sur la grundon.

2 La ekonomio de tiu lando prosperis brile, ĉar la registaro havis bonan programon.

⇒

3 Se vi estos bonaj gelernantoj dum mia kurso, mi aĉetos luksan aviadilon, por ke vi ĉiuj kaj mi vojaĝu ĉirkaŭ la mondo.

⇒

4 Hieraŭ en loka ĵurnalo aperis artikolo pri Esperanto kaj la Kastelo de Grésillon.

⇒

5 Li metis la vortaron sur la breton en la ŝranko kie ĝi nun staras.

⇒

6 La patrino milde metis la bebon en la lulilon kie ĝi nun kuŝas.

⇒

7 La pupo sidas en la seĝo, ĉar la infano metis ĝin tien.

⇒

8 La frosto daŭris pro la fakto, ke la norda vento ne ĉesis blovi.

⇒

9 La muŝoj <u>mortis</u> pro la malamikaj batoj de la muŝbatilo de Sinjoro Nopo.

⇒

10 Per tiu katastrofo <u>okazis</u> la mortoj de iuj pasaĝeroj.

⇒

11 Ludoviko manĝis tro da pikanka saŭco por la vespermanĝo, kaj li <u>sonĝis</u> pri ruĝaj monstroj la tutan nokton!

⇒

12 Kelkajn minutojn antaŭ la dimanĉa diservo, la sonoriloj de la sonorilturo de la preĝejeto <u>sonoras</u>. Estas la pastro kiu faras tion.

⇒

13 Estis iom post la tria matene. Subite la kokoj kaj kokinoj, kaproj kaj kaprinoj, bovoj kaj bovinoj, kaj ĉiuj aliaj bestoj de la farmobieno <u>ekblekis</u>. La alveno de aŭ vulpo aŭ lupo kaŭzis tiun bruegon.

⇒

14 Sinjoro Nopo havas strangajn vestojn kaj frenezan konduton. Pro ĉio ĉi ni <u>ridas</u>.

⇒

15 Pro tro da polvo kaj aliaj eroj en la aero, Petro <u>ternadis</u> la tutan tagon kaj la tutan nokton.

⇒

16 La popolo <u>ribelis</u>, ĉar la estroj de la lando estis kruelaj kaj suferigaj.

⇒

17 Sinjoro Medrano <u>restis</u> hejme la tutan posttagmezon pro la pluvego kaj forta vento.

⇒

Vi lernos:

**Diskuti kaj Interparoli**

Nun lernu interŝanĝi ideojn kaj diskuti, uzante la sekvantajn frazojn. Klopodu utiligi (uzi) frazojn el ĉiu grupo!

| | | |
|---|---|---|
| 1 | Laŭ mia opinio, | vi pravas. . . |
| | Laŭ mi, | vi malpravas. . . |
| | Mia opinio estas, | ke. . . |
| | Miaopinie, | vi eraras. |
| | Ŝajnas al mi, | ke vi troigas |
| 2 | Mi estas certa, | ke |
| | Estas certe, | ke |
| | Tio estas certa, | ke |
| | Estas fakto, | ke |
| | Mi dubas, | ĉu |
| | (Ne) Estas vere, | ke |
| | Tio estas vera, | ke |
| | Estas verŝajne, | ke |
| | Verŝajnas, | ke |
| | Estas dubinde, | ĉu |
| 3 | Vi pravas | kiam vi diras, ke. . . |
| | Vi ne pravas | pri tio. |
| | Vere. | |
| | Certe. | |
| | Tio (ne) estas vera. | |
| 4 | Mi samopinias, | sed |
| | Mi samopinias, | tamen |
| | Mi (ne) havas la saman opinion, ĉar. . . | |
| | Ĝuste! | |
| | Mi (tute) konsentas kun vi pri tio. | |
| | Kontraŭe! Male! | |

Vi lernos, kaj praktikos

## Interŝanĝoj de ideoj II

Elektu iujn, ne ĉiujn, el la sekvantaj temoj kaj diskutu pri ili uzante frazojn de la antaŭa paĝo. Vi povas uzi ĉi tiujn ekzemplojn aŭ, se vi preferas, elpensi viajn proprajn temojn. Ni uzos almenaŭ 20 minutojn por ĉi tiu ekzerco.

1 Kion vi opinias pri la vetero en nia urbo?
2 Kion vi pensas pri Esperanto?
3 Kio estas via opinio pri intensivaj kursoj de lingvoj?
4 Kiel vi reagas rilate Jugoslavion?

5 Futbalo estas la plej bona sporto, ĉu ne?
6 Ĉu vi ne konsentas kun mi, ke la plej bela loko por feriado estas la montaro?
7 Laŭ vi, kion ni devas fari por lerni Esperanton plej rapide (=rapidege)?
8 Laŭ via opinio, ĉu infanoj devas lerni Esperanton en la lernejoj?

9 Legi libron estas pli profitdona ol rigardi filmon, ĉu?
10 Estas tro da krimoj kaj krimetoj en niaj urbegoj. Kion fari?
11 Ni devas konstrui novajn aŭtovojojn ĉie. Kial ne?
12 La plej bela lando en Eŭropo estas, sen dubo, Svisio.

13 Viroj estas pli logikaj ol virinoj, ĉu mi ne pravas?
14 Oni devas forigi la miltservon. Prave aŭ ne?
15 Ĉiuj devas lerni la anglan lingvon. Kiun opinion vi havas pri tio?
16 Pli bone ŝparema ol malŝparema!
17 Kreu viajn propajn temojn!!

## Vi lernos, kaj praktikos skribe

$V_{tr}$ + iĝ <=> $V_{ntr}$

1 Kiel kutime mi vekiĝis ĉi matene iomete antaŭ la sepa.

⇒ Kiel kutime mi vekis min ĉi matene iomete antaŭ la sepa.

2 La granda vitro de la fenestro rompiĝis en mil pecojn.

⇒

3 En la ludado, la ludantoj rulas la globon ĝis la kegloj por renversi ilin.

⇒

4 Tiaj fungoj troviĝas ĉie en la arbaro.

⇒

5 Ŝia dua filo naskiĝis en la sama ĉambro en la sama hospitalo en la sama tago!

⇒

6 Oni povis aŭdi la tre malproksimajn sed timigajn blekojn, kriojn, kaj muĝojn de la sovaĝaj bestoj en la praarbaro.

⇒

7 Ŝvitante, Pablo levis la tre pezajn pezilojn malrapide.

⇒

8 La leciono komenciĝis je la 9a, kaj finiĝis je la 10a.

⇒

⇒

## Vi lernos, kaj praktikos

## Paroli pri la vetero

1 Ĉu estas varme hodiaŭ?
2 Ĉu estis pli varme aŭ pli malvarme hieraŭ?
3 Ĉu pluvis hieraŭ kaj hodiaŭ?
4 Ĉu estas suno nun? (Ĉu sunas?)

5 Kion faras la turistoj kiuj ferias ĉe la plaĝo kiam sunas multe?
6 Kion vi farus se neĝus nun?
7 Kia estas la nuntempa temperaturo? Kiom da gradoj estas pli malpli?
8 Kian veteron ni havas kutime en somero?

9 Kiajn veterojn ni havas en aŭtuno, vintro, kaj printempo?
10 Bonvolu diri al mi, kian veteron vi preferas? Kial?
11 Kion oni surmetas kiam frostas?
12 Kion oni kunportas kiam pluvas kaj forte ventas?

13 Laŭ vi, kie troviĝas la plej bela vetero en la tuta mondo?
14 Se vi loĝas en Francio, ĉu vi povas klarigi al mi, kio estas la ventoj mistralo kaj tranmontano?
15 Se vi loĝas en intertropika Azio, klarigu al mi, kio musono estas.
16 Donu al mi ekzemplon de veteraĉo.

17 Ĉu pravas ĉiam la veterinformoj de la ĵurnaloj, radioelsendoj, kaj televizio?
18 Ĉu estas vere, ke heliĝas kiam la suno leviĝas, kaj malheliĝas kiam la suno subiras?
19 Ĉu estas fakto, ke tornadoj, uraganoj, tajfunoj, kaj ciclonoj estas fortaj ventegoj?
20 Ĉu estas fakto, ke la ĉielo nun estas kovrita de nuboj? Alivorte, ĉu la ĉielo estas nubokovrita?

21 Diru al mi kelkajn vortojn pri la hodiaŭa vetero.
22 Klarigu al mi, kio okazis vetere hieraŭ kaj antaŭhieraŭ.
23 Ĉu vi preferas neĝon al pluvon, aŭ male?
24 Ĉu vi preferas promeni sub pluvo ol promeni sub neĝo, aŭ kontraŭe?

## Vi lernos, kaj praktikos

IG, IĜ

1 La vojaĝantoj supreniris la ŝtuparon kaj eniris en la ŝipon.

=> La vojaĝantoj enŝipiĝis.

2 Mi iris en la liton je la deka vespere hieraŭ.

=>

3 Je la sepa kaj kelkaj minutoj la sekvantan matenon, mi vekiĝis kaj iris el la lito.

=>

4 La vilaĝestro de la malgranda vilaĝo mortis. Post la funebra procesio oni metis lian ĉerkon en la teron en la tombejo.

=>

5 Maria prenis la leteron de sia amiko kaj metis ĝin en sian poŝon.

=>

6 Rikardo metis la manĝilaron, la manĝaĵojn kaj la trinkaĵojn sur la tablon.

=>

7 Viktoro apenaŭ manĝis dum la vojaĝo. Li havis mankon da manĝajoj. Post la longa vojaĝo li estas sen forto.

=>

8 La bebo metis ĉion kion ĝi povis en la buŝon!

=>

## Vi lernos, kaj praktikos skribe

Vntr + iĝ = Vntr

1 Mi ekkuŝas akurate ĉiutage je la deka kaj tri kvaronoj vespere.

⇛

2 La kursgvidanto diris al la kursanoj dum sesio de *TPR*, "Bonvolu ekkaŭri."

⇛

3 Post la debato, la partoprenantoj kaj la ĉeestantoj ekstaris kaj foriris.

⇛

4 Antaŭ la konferenco, la partoprenantoj eksidis.

⇛

5 Je la alta temperaturo, la akvo komencis boli.

⇛

6 Post la alveno de la novaĵo de la morto de nia kara amiko, estis funebra etoso en la salono.

⇛

## Vi lernos, kaj praktikos

### Repasado

1 Ĉu Rikardo fumas?

2 Ĉu li fumas cigaredon?

3 Ĉu li estas la ununura persono kiun vi vidas fumi?

4 Diru al mi, kia estas la pipo kiun li fumas.

5 Laŭ vi, ĉu la fumo de pipo bonodoras, aŭ ĉu ĝi malbonodoras?

6 Kaj kion vi pensas pri la odoro de cigaro? Ĉu cigaroj havas bonan odoron aŭ malbonan odoron?

7 Ĉu vi konas iun kiu fumas pipon? Se jes, priskribu tiun personon iom.

8 Kaj vi mem, ĉu vi estas fumanto aŭ nefumanto?

9 Ĉu fumi en la lito estas konsilinde? Kial ne?

10 Kiamaniere ekbruligas Rikardo sian pipon? Per torĉo, per kandelo, aŭ per alumeto? Kion vi pensas?

11 Ĉu estas permesate fumi en lokoj por nefumantoj?

12 Kion diras la kuracistoj kaj flegistoj pri fumado?

13 Ĉu oni povas malsani fumante tro?

14 Laŭ via sperto, ĉu la prezo de tabako plialtiĝas aŭ malplialtiĝas?

15 Ĉu, viaopinie, estas tro da impostoj aŭ ne sufiĉe da impostoj sur cigaredoj?

16 Kiu profitas de la fumado?

## Vi lernos, kaj praktikos skribe

| | | | |
|---|---|---|---|
| ĉiu(j)(n), | kiu(j)(n) | ĉio(n), | kio(n) |
| iu(j)(n), | kiu(j)(n) | io(n), | kio(n) |
| tiu(j)(n), | kiu(j)(n) | tio(n), | kio(n) |
| neniu(n), | kiu(n) | nenio(n), | kio(n) |

## EKZEMPLOJ -- Subjektoj

1 Ĉiuj kiuj lernas Esperanton pli rapide akiras aliajn lingvojn.
S

2 Forgesis sian pluvombrelon kaj gantojn iu kiu venis ĉi tien hieraŭ.

3 Tiu kiu pruntepreni la libron Don Kiĥoto de la biblioteko redonos ĝin al ni post du semajnoj.

4 Neniu kiu lernas Esperanton per la BEKKurso miskomprenas la akuzativon.

5 Ĉiuj kiujn vi vidas ĉi tie en ĉi tiu klasĉambro estas miaj gelernantoj.

6 Tiuj kiujn vi vidis apud la tablo en la trinkejo estas novaj geesperantistoj.

7 Mi havas bonan novaĵon por vi: iu kiun vi bone konas diris al mi, ke ŝi vizitos vin morgaŭ posttagmeze.

8 Ĉio kio estas en tiu ĉi tirkesto estas por via uzo: la skribiloj, krajonoj, liniilo, gluo, frotgumo, ortilo, cirkelo, papero, klipdratoj, kovertoj, krampilo, krampetoj kaj tiel plu.

9 Ĉio kion la instruisto donas al siaj gelernantoj estas por helpi ilin lerni pli bone kaj pli rapide.

10 Falis sur la plankon tio kion Ana lasis sur la tablon.

11 Nenio kion tiu friponaĉo diras estas vera.

# EKZERCO -- Subjektoj

1 Ĉ___ k___ studas Esperanton lernas aliajn fremdlingvojn pli rapide.

2 I___ k___ estis ĉi tie en nia klasĉambro lasis sian ĉapon.

3 I___ k___ vi bone konas diris al mi, ke ŝi amas vin multege! Divenu kiun!

4 Ne sufiĉe bone kaj flue parolos t___ k___ ne praktikos Esperanton almenaŭ kelkajn minutojn ĉiutage. Ili parolos nur malrapide.

5 N___ k___ mi konas estas mensogisto.

6 Pako havas bonan memoron. Restas en lia memoro ĉ___ k___ li legas aŭ aŭdas.

7 Pako havas bonan memoron. Ĉ___ k___ estas en lia memoro restas.

8 Mia veturilo paneis. Ĉu vi havas ilojn por helpi min ripari ĝin? Bedaŭrinde, n___ k___ mi havas utilos al vi por ripari vian aŭton.

9 Ĉ___ k___ studas diligente la BEKKurson sukcesos en la BEK Ekzamenego ĉe la fino de la kurso. Ili ricevos BEK Diplomon.

10 T___ k___ estas la plej alta en nia loka grupo de Esperanto estas ankaŭ la plej maljuna.

11 Ĉ___ k___ estas en tiu libro estas tre interesa.

12 Ne ĉ___ estas oro, k___ brilas.

13 T___ kun k___ mi parolis estas miaj genajbaroj.

14 Estas vere, ke estas i___ k___ pensas tiamaniere, sed ne ĉiuj.

15 T___ k___ vi lernas pri la transitivaj kaj netransitivaj verboj estas bonega por vi, kredu min, Sinjoro!

16 -Divenu (tion) kion mi havas malantaŭ mia dorso!
-Ĉu estas i___ per k___ oni povas skribi? Ĉu ĝi estas skribilo?
-Prave! Tio ĝi estas!

# EKZEMPLOJ -- Rektaj Objektoj

1 Ĉu vi konas ĉiujn kiuj venis al nia festo de Novjaro?

2 Ĉu vi konas iun kiu povas ripari nian fridujon kiu paneis?

3 Voku tiun kiun ni venigis la lastan fojon por ripari ĝin.

4 Mi petas vin iri al la apoteko kaj aĉeti ion kio estas bona kontraŭ mia tuso.

5 La juĝisto demandis al la atestanto, ĉu li vidis ĉion kio okazis kiam la gansteroj rabis la bankon.

6 Nenion kion vi vidis mi vidis, ĉar mi dormis tiumomente!

# EKZERCOJ

1 Diru al mi ĉ___ k___ vi bezonos por la vojaĝo al la montaro.

2 Ĉu vi rememoras ĉ___ k___ ĉeestis la kunsidon de la estraro de la klubo de Esperanto lastmonate?

3 Mi konas n___ k___ ne povas profiti de la lernado de la internacia lingvo Esperanto.

4 T___ k___ alvenis tre malf[illegible] matematika leciono la profesoro riproĉis.

5 Ĉu vi vidas t___ k___ mi vidas? Ruĝan elefanton!

6 Mi havas i___ k___ povas esti utila al vi dum la vojaĝo al Parizo: planon de la subtertrajno.

7 Ĉ___ k___ vi ŝatas, ankaŭ mi ŝatas. Ĉu manĝaĵojn, ĉu trinkaĵojn.

8 Ĉu vi konas i___ kun k___ mi povas praktiki Esperanton?

9 Pablo, bonvolu helpi t___ gelernantojn al k___ mi donis la ekzercojn.

# EKZEMPLOJ --NEREKTAJ OBJEKTOJ

1 Ni donos la premion al tiu kiu havos la plej altan poentaron en la briĝa konkurso.

2 En la Olimpikaj Ludoj oni donas la oran, arĝentan, kaj bronzan medalojn al tiuj kiuj finiĝas unue, due, kaj trie.

3 Okazis granda festo en la bazlernejo, kaj al ĉiuj kiuj partoprenis oni donis belan malgrandan donacon.

4 Estos bela diplomo por ĉiuj kiuj sukcese ekzameniĝis ĉe la fino de la BEKKurso.

5 Bonvolu alporti la trinkaĵojn al tiuj kiujn vi vidas ĉe la unua tablo.

# EKZERCO

1 Donu sukeraĵon nur al t___ infanoj k___ bone kondutas.

2 La limonado kaj aliaj trinkaĵoj estas por t___ k___ piknikas kun ni.

3 Sendu la leteron al t___ kun k___ mi parolis telefone ĉi matene. Ŝi atendas ĝin.

4 Kia estas la ludo? Jen: mi ĵetos la pilkon al t__ k__ respondos ĝuste unue al mia demando.

5 Ĉi tiu naĝejo estas por nur t___ k___ loĝas en la urbo.

6 Al t___ k___ finos la taskon unue mi donos malgrandan premion.

## EKZEMPLOJ -- Cirkonstancaj komplementoj

1 Ĉi tio estas la kompleta listo de ĉiuj kiuj abonas nian revuon.

2 Ŝi venis al la balo kun tiu kiu invitis ŝin tien lastjare.

3 Feliĉe, Superhomo luktis kontraŭ ĉio kio estas malbona kaj neleĝa.

4 Per io kion oni vendas en apoteko, vi povas facili kuraci vian malsanon.

5 La festo kiu okazis hieraŭ estis la plej sukcesa de la jaro laŭ ĉiuj kiuj ĉeestis.

6 Ni ne povas eniri en tiu ĉambro sen tiu kiu havas la ŝlosilon.

7 Vi povas facile ripari la motoron per tiu ilo kiu estas en la kofro.

8 Bonvolu sidiĝi inter tiuj kiuj surhavas la bluajn ĉemizojn.

9 Feliĉe, Superhomo luktis kontraŭ ĉiuj kiuj estis malbonuloj.

10 Ĉiuj ferios en aŭgusto krom tiuj kiuj devas labori, kompreneble.

11 Hieraŭ mi sidis en kinejo apud iu kiun vi tre bone konas: Ramono!

12 Estas romano pri iu kiu havas aŭtisman fraton.

13 Esperanto estas bonega lingvo por tiuj personoj kiuj deziras malkovri novajn kulturojn.

## EKZERCO

1 La libro kiun mi aĉetis lastsemajne estas pri i___ k___ vendas ĉion por aĉeti velŝipon kaj navigi ĉirkaŭ la mondo. Li sukcesis, kaj poste li mem verkis aventurajn librojn!

2 Dum la festo li babilis kun ĉ___ k___ li konis.

3 Ne forgesu! Ne foriru sen t___ k___ mi donis al vi!

4 Ĉiuj pagis en julio la kotizon por la Esperanta Asocio krom t___ k___ feriis tiumomente. Ili sendos la monon al ni kiam ili revenos.